

SUDFRANCIA STELO

Esperanto-federacio Langvedoko-Rusiljono



De longe, ne aperis nia bulteno!

Pro multaj kialoj, manko de aktiveco, eĉ se, en la sekvontaj paĝoj, vi konstatos, ke ni tamen, ankoraŭ moviĝas; kelkaj kluboj havas gravajn problemojn, sed ĉi-jaron, 20 novaj lernantoj decidis lerni nian belan lingvon en Nimeo & Montpeliero.

La grupo de Montpellier decidis helpi por eldoni novan bultenon, jen ĝi!

Ni esperas, ke ĝi daŭre vivos kaj ke vi ĝin ŝatos.

Sommaire

les 6 derniers mois de 2018, des visiteurs, un Congrès universel et des rencontres...

*Pour toute remarque ou participation :
martine.ragonnet@orange.fr*

Eventoj, Turneoj...

La 8-an de junio, la grupo de Montpellier gastigis Julian **Modest**, li prelegis en la kafejo « le Dôme » pri la plej belaj urboj ĉe la nigra maro.



La 18an de februaro, la klubo de béziers gastigos Alan Neven **Kovacic** el Zagrebo, kiu naskiĝis en 1956.

Li jam vizitis nian landon.

Li laboras kiel turisma aganto & memstara internacia konferenca interpretisto.

Alan estas multlingva parolanto.

Lia vojaĝo estas tro mallonga, li ne havos sufiĉan tempon por prelegi, sed sufiĉe por viziti nian

regionon.

La tago ne estas ankoraŭ planita sed verŝajne, ni vizitos la belan urbon Sète. (Muzeon?)... ni mangôs laŭ la vetero ekstere aŭ en restoracio.




Por pliaj informoj, kontaktu la klubon de Beziars aŭ de Montpellier.

La grupo de Montpellier partoprenos, ni nin organizos aŭ trajne, aŭ aŭte, do ne hezitu partopreni.

En Montpellier, nia grupo partoprenis plurajn asociajn eventojn, Fête de l'Escoutaire, Mondial des cultures,



Forum des associations....



Restado de Dennis Keefe en Béziers

De la 4an de novembro ĝis la 8an de decembro 2018, Dennis Keefe vizitis Francion kaj finis sian turneon en Béziers. Tiel ni ĝojis ricevi lin por la Zamenhofa Tago.

Alvenanta jaŭdon la 6-an de decembro je la fino de la posttagmezo, li estis akceptita ĉe familio Passarella en Servian kie li vizitis la urbeton. Post tiom longa kaj senpaŭza vojaĝo, la grupo decidis organizi trankvilan kaj turisman programon. Tiel la sekvantan tagon matene, mi akompanis lin por malkovri la plej faman kaj nun mondkonatan vidindaĵon de la urbo, tio estas 'la naŭ kluzojn de Fonseranes', veran akvan ŝtuparon kiu multe impresis Dennis. Poste ni devis atingi la centron de la urbo kaj pro malfacilaĵo por parki, ni finfine trovis lokon ĉe 'Malnova Tombejo' kiun oportune ni tre rapide vizitis. Tiu tombejo entenas multajn belegajn tombojn de riĉaj burĝoj.

Tagmeze, ni atingis restoracion kie jam atendis nin kelkaj samideanoj de nia grupo. En gaja etoso ni interparolis, kiam viro je apuda tablo demandis ĉu ni estas esperantistoj. Post nia konfirmo, li rakontis ke li estas muzikisto kaj antaŭ kelkaj jaroj, profesie li muzikis en Bialistoko kie li loĝis en hotelo 'Esperanto' kaj tiel malkovris nian lingvon ! Poste, ni kondukis nian vizitanton en la malnovan parton de la urbo laŭ tradicia programo. Kuraĝe, en la katedralo, li supreniris ĝis la plej alta turo de la konstruaĵo, (pli ol 140 ŝtupoj tre mallarĝaj). Dennis estas pli ol 1,90m granda kaj sporta viro.



La 8-an de decembro, ni organizis nian Zamenhofan Tagon, Dennis konsentis restadi unu tagon pli por partopreni. Ni

kutime invitas la membrojn de aliaj gupoj de la regiono. Bedaŭrinde pro la politikaj eventoj de tiu momento, kelkaj ne povis veni pro nuligo de trajno aŭ simple pro sento de malsekureco. Tamen sukcese, Jean-Marie LOT el Montpellier raportis pri la lasta Universala Kongreso en Lisbono per rakonto kaj fotoj. Post la tradicia tagmanĝo – ĉiu ion kunportas kaj proponas por komuna gustumado – Dennis rakontis al ni sian unuan vojaĝon en Ĉinio. Helpe de fotoj, li tre lerte raportis tre detalajn faktojn pri la malkovro de nova mondo por li. Malfeliĉe, la prezentado estis interrompita pro svenado de



samideanino, ni devis voki helpon de fajrobrigadistoj kiuj forkondukis ŝin – feliĉe, ŝia sanstato rapide pliboniĝis kaj ŝi revenis hejmen dum la vespero -. Dennis tamen finis sian paroladon sed tio ne lasis tempon organizi ludon kiun ni esperas povi prezenti en alia okazo.



Dimanĉon matene, li forlasis nian belan urbon por atingi Barcelonon trajne. Ni tre ĝojis akcepti denove samideanon kiu kiel kutime montras novajn aspektojn de nia movado, kiel diversaj ni estas, kaj ankaŭ kiel granda estas nia komunumo. Ni jam povas anonci ke nia grupo akceptos, ĉiam kadre de enfranca turneo, Alan Neven KOVACIC, samideanon el Kroatio de la 17a ĝis la 19a de februaro kaj denove Beziers estos la lasta etapo ! Programo ne estas tute preta, ni baldaŭ informos vin.



Por la grupo de Béziers, Jean-François Passarella



La 103-a Universala Kongreso de Esperanto en Lisbono (PORTUGALIO)

Mi vojaĝis per aviadilo el Marsejlo ĝis Lisbono kaj daŭrigis la vojaĝon el la flughaveno ĝis la kongresejo per metroo.

La kongreso okazis en la universitato de Lisbono, (fakultato pri Juro), norde de la urbo.

Sabaton mi foriris al Peniche, malgranda urbo ĉe la oceano kaj dum la vespero post la registriĝo mi vizitis la Movadan Foiron.

Kongresa temo estis: “Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: Kien nun?”

Dimanĉon, post la salutoj de ĉiuj landoj, (1567 partoprenantoj el 73 landoj) oni kantis la Esperon, kaj la Prezidanto de UEA Mark FETTES malfermis la 103-an UK-on.

Mi renkontis aliajn samideanojn de nia departemento : Jean-François kaj Gisela PASSARELLA, kaj ankaŭ la Montpelieranojn, Larisa OSADCHUK, Alain DELMOTTE, Florian CEZARD.

La solena malfermo kaj la nacia vespero okazis en la centra urbo, pli precize en la “Coliseu dos Recreios”, (Lisbon Coliseum estas koncerta salono dediĉita al muzikaj prezentoj)

Merkredon, Tuttagaj ekskursoj. Mi elektis la turneon : Óbidos, Nazaré, Batalha, Fátima...

Jaŭdon, La vetero varmiĝis, la varma ondo ĉi-tie atingis kvardek gradojn !!!

Mi ekskursis al Evora kiu estas sude de Lisbono ; ĝi estas urbo en la listo de Unesko kiel Monda Heredaĵo.

Mi ĉeestis kelkajn prelegojn de la sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU).



La oficialaj reprezentantoj de la kongreso dum la malfermo



Populara grupo de la Algarveo kun siaj tipaj kostumoj de ĉiu profesio

Aliaj prelegoj kiujn mi ŝatis: Portugalan eksprese, Okcitanan lingvon, kaj ankoraŭ la Sukcesojn kaj perspektivojn en planedo-scienco, kies celo estas la studado kaj esplorado de objektoj en nia sunsistemo: planedoj, satelitoj, asteroidoj kaj kometoj.

La estonta projekto estos konstrui teleskopon je tridek metroj-da diametro en Ĉilio por malkovri kaj studi ekstersunsystemajn planedojn...

Dum la solena fermo, la prezidanto dankis la portugalan komitaton, la helpantojn.

Post la transdono de la flago al la Finnlandanoj kaj la bonvenaj vortoj, la infanoj vizitis nin kaj kantis antaŭ paperaviadila batalo kiun ili faris per origamio.

Ĝis la venonta Universala Kongreso en Lathio...

Jean-Marie



Urbo fortikigita, el romia origino, ĝi estis okupata de la Maŭroj ĝis 1148.



Ekstere de la oceano, Nazaré-kanjono estas internacia fama surfado kie registroj de la plej grandaj surfaj ondoj rompiĝas regule.



Monaĥejo de Batalha konstruita por memorfesti la portugalan venkon super la Kastilioj ĉe la Batalo de Aljubarrota en 1385,



Fátima fariĝis fama danke al la sanktejo Nia Sinjorino de Fátima, konstruita por memorfesti la aperojn de la Virgulino Maria en 1917



La Manĝebla Arbaro

Kion signifas la vortoj « Manĝebla Arbaro », aŭ « Ĝardenita Arbaro » ? Ili karakterizas aron da plantoj, de la arboj ĝis la herboj, kies produktaĵoj estas manĝeblaj de la homoj.

Tiu koncepto estas tre malnova, oni jam trovas ĝin ĉe la oazoj antaŭ miloj da jaroj; Tie, la manĝeblaj arbaroj prosperas sub la tropikaj klimatoj.

La manĝebla arbaro estas la alkonformigo sub niaj mildaj klimatoj de la principo de la oazoj : temas pri sciencula maniero kultivi la plantojn por maksimume profiti de la luma energio kaj de havebla spaco. Tiel, oni trovas grandajn arbojn kiel palmon; sub tiuj-ĉi staras pli malgrandaj arboj, kiel abrikotarbo, kaj fine tufarbustoj, legomoj, furaĝa herbo....Tie, la vegetala produktaĵo ne dependas de la surfaco (kvadrata metro) sed de la amplekso (kuba metro) ekspluatita.

Sub niaj mildaj klimatoj, la lumo estas malpli intensa, la temperaturoj malsamaj, la sezonoj alternas. Tamen, multaj studadoj kaj eksperimentoj ebligis sukcesajn alkonformigojn de tiuj ekspluatadoj. Tiel, la diversaj vegetalaj specioj estas metode organizataj en stratumoj.

- Stratumo de grandaj arboj : juglandarbo, kaŝtandarbo, migdalarbo, ĉerizarbo, prunarbo....
- Stratumo de trunkarbedo: ribujo, grosujo, frambujo, avelujo En tiu stratumo, eblas kultivi « salatajn plantojn » por rikolti bonajn kaj molajn foliojn : atriplon, sedon, receptan tilion...
- Stratumo de grimpoplantoj : la arboj povas facile palissubteni grimpoplantojn kiel viton, kivion..
- Stratumo kun herbo kaj grundoplantoj : arbara frago, sovaĝa poreo, ĉiama cepo, rozkolora ajlo....Plie, oni povas meti micelion en la grundon por havi fungojn.

Kompreneble, oni devas prizorgi la fekundigadon. La plej bona maniero estas kultivi fikskapablajn nitrogeno-plantojn : simfiton, alnon, robinion...

La plejmulto de la plantoj estas mieldonaj : do, ni metu abelujon !

Por lokmeti tiujn diversajn plantojn, necesas konsideri iliajn specifajn demandojn pri lumo kaj ilian toleremon pri ombro.

La « Manĝebla Arbaro ne bezonas tre grandan surfacon. Kelkaj centoj aŭ miloj da kvadrataj metroj sufiĉas por ke homoj kultivu centon da varietatoj laŭ siaj gustoj kaj deziroj.

Fine, oni devas cerbumi pri la ĝuste taŭga enradikigo de la plantoj, krei agrablajn iradojn, eventuale konstrui saloneton en malgranda senarbejo, por profiti aŭtonomecon kaj abundecon en plej laŭcela loko.

Serge Eysseric

-
Bibliografio :

- L'arbre au jardin bio, Guide de Terre Vivante*
- La Forêt Jardin, de Martin Crawford Chez Ulmer*

Breve

* *Jean Marie Lot* vient de confectionner 2 petits livrets en espéranto pour les invités des tournées!

Un sur Montpellier et un sur Grenoble.

Bonne idée, à reprendre pour ceux qui souhaitent faire de même pour leur ville!

* *La krokodilet'* a changé d'adresse:

« Nous vous rappelons notre changement de nom de domaine, esperanto-midipyrenees.org n'existe plus, laissant place à **occeo.net**."

* *Des nouvelles du site fédéral* en lien avec Toulouse (et notre appartenance à la nouvelle région Occitanie):

Kvankam la regionoj Languedoc-Roussillon kaj Midi-Pyrénées ne plu ekzistas kaj iĝis Occitanie, la du federacioj decidis ne kunfandiĝi. Tamen, ilin pli kunigi kaj faciligi ilian inter-konadon ŝajnas des pli kongrua ke la du regionoj unuĝis.

Tiel, la du federacioj decidis krei novan kaj nuran retejon por la regiono « Occitanie », prezentante kaj la du federaciojn kaj la klubojn de la regiono, ano aŭ neano de la federacioj.

Dum preskaŭ unu jaro, Marion Quenut (federacio de Midi-Pyrénées) kaj Florian Cezard (federacio de Languedoc-Roussillon) kuncerbumis kaj kunlaboris por krei tiun novan retejon, celante pli klaran, simplan, allogan kaj kompletan retpaĝaron. Post la cerbumado, Marion, kiu jam kutimis krei kaj organizi la retejon de la federacio de Midi-Pyrénées kaj de Toulouse, kreis la retejon.

Nova retejo necesis trovi simplan kaj mallongan retadreson, cĉar, ekzemple, « esperanto-occitanie.net » estas tro longa, ne facile literumita (ekzemple dum la radio elsendo cĉe Toulouse). Des pli mallonga ke ekzistu subretadresojn por la lokaj kluboj (ekzemple toulouse.esperanto-occitanie.net).

Tiel, post diskutado dum pluraj anoj de la du federacioj, la nomo estas « occeo.net » (elparolu « okseo ») por occitanie esperanto.

Do, cĉe tiu nova retejo, kion vi trovas kaj trovos ?

1. Sur la hejmapaĝo, la vizitanto malkovras mapon montrante la klubojn kaj grupojn de geesperantistoj
2. Ŝi/li ankaŭ trovas ekvidon de la eventoj kaj de la pli ĵusaj artikoloj
3. Estas loko por aliĝi al la (pli malpli oftaj) informleterojn
4. Ŝi/li povas ankaŭ informiĝi pri Esperanto, la du federacioj, kaj ankaŭ pri la kluboj.

Ĉiu klubo povas mendi retpaĝon, eĉ tutan retejon, kun retadreso kiel « lokaklub.occeo.net ». La kluboj, kiuj tion volas, povas krei kaj organizi iliajn paĝojn tiel, kiel ili volas kaj bezonas.

Nur informu Marion Quenut aŭ Florian Cezard.

Nepre ne hezitu viziti la retejon kaj nin indiki, kio estas plibonigota laŭ vi, ĉar la retejo estas novega, kaj multe ankoraŭ faronta !

Pli ol nur nova retejo, tiu projekto celas esti unua paŝo al aliaj kunaj projektoj, kaj pli bona interkonado. Nova propono estas organizi du jarajn renkontojn : unu ĉe Midi-Pyrénées (la federacio proponas gastigi nin sabate, la 16an de marso, dum « Semeo », la semajno de Esperanto ĉe Tuluzo).

Ni do devu sciigi ĝin kaj proponi alian daton por gastigi ilin poste.

Florian

florian.cezard@protonmail.com



Et pour terminer, n'oublions pas les pommiers « Espéranto » de nos amis lozériens, qui se sont répandus à travers la France.

« Nous avons coupé une vingtaine de greffons à notre pommier et les avons expédiés, début février, à Emmanuel ROLLAND, spécialiste de la greffe et du jardinage (après avoir été professeur).

Nous sommes allés chercher 5 pommiers (à la Chapelle de l'Iff en Bretagne), à la mi-mai. 2 ont été pris par Céline, et son voisin vient d'en planter un ; 1 ou 2 sont pour nous ;

Les autres pommiers restés en Bretagne sont déjà tous pris.